



PILO-PRESS

Internacia Inform servo

N-ro 2/1973 10 jan 73
Aperas ĉiusemajne
=====

3a Jarkolekto

Abonprezo 1973

- 20,- GM -

P&Konto Nürnberg

819 56 - 851
=====

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 2

Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

GRAVA DUTAGA KUNVENO EN LJUBLJANA

Ĉu tutjugoslavia aŭ tutmonda "atakplano" ?

La 16-an kaj 17-an de decembro 1972 Slovenia Esperanto-Ligo iniciatis en Ljubljana eksterordinaran ĉefkunvenon kiu laŭ temo pri-traktita transiris ne nur la limojn de PR Slovenio sed ankaŭ de Jugoslavio. Ĝuste pro tio ni sentas ke estas nia devo informi pri ĝi la tutmondan esperantistaron.

Pasis unu jaro post kiam Slovenia Esperanto-Ligo kaj Esperanto-Instituto Ljubljana entreprenis programitan sinsekvantan enketadon rilate la Internacian Lingvon inter diversaj popoltavoloj en Slovenio. Per la kvar demandoj oni deziris registri la interesigon por eventuala televida Esperanto-kurso, krome palpi la ĝeneralan interesigon pri la Esperanto-movado kaj sondi sintenon al Esperanto en lernejoj.

En 60 komunumoj de SR Slovenio estis enketitaj 978 institucioj kaj organizaĵoj kaj el ili 864 (88 %) farigis "Amikoj de Esperanto". La enketadon subtenis pli ol 500 ĝeinstruistoj en elementaj lernejoj de 40 komunumoj, kiuj anoncis sin al la speciala koresponda kurso por povi poste ĝinstrui la Internacian Lingvon en siaj lernejoj.

La Komisiono por la laborplano kaj reorganizo de la Ligo atente prikonsideris la respondojn, kolektitajn dum la enketado kaj konstatis ke la afero ricevis karakteron de la laborprogramo, ke la granda plimulto de lernejoj estas pretaj prepari la enkondukon de Esperanto en regulan programon kiel fakultativan lernobjekton kaj ke la loĝantaro esprimis deziron esti regule informata pri la E-movado en la mondo kaj en la lando.

Ĉar la socio alvokas nin al agado, la Komisiono proponis krei en ĉiuj komunumoj lokajn aktivajn agadgrupojn en kiuj organizite ek-agu esperantistoj kune kun "Amikoj de Esperanto" por realigado de komune akceptita programo.

Konsiderante, ke ĉi tio devigas difini antaŭ ĉio la koncepton pri la rolo de la Internacia Lingvo en internaciaj rilatoj, la Komisiono preparis proponon de la Deklaracio pri la rolo de la lingvo en rilatoj inter la nacioj kaj naciecaj grupoj, adresota al la publiko, al la parlamento kaj al la politikaj forumoj.

Montrigis, ke la proponotaj programo kaj organizaj ŝanĝoj, kaj precipe decidoj, havos tian karakteron, ke ili rekte aŭ nerekte ricevos tutjugoslavian karakteron. Tial la estraro de SLEL en konsento kun Administra Komitato de Jugoslavia Esperanto-Ligo organizis la 17-an de decembro 1972 neformalan konferencon de enlandaj Esperanto-organizaĵoj kaj institucioj, kiuj pritraktis la situacion de Esperanto en Jugoslavio kaj eventualan reeŝon en eksterlando. La konferencon partoprenis la prezidanto de JEL, prof. d-ro Boĵa Popoviĉ, la reprezentantoj de aliaj landaj E-ligoj, de LKK de la 58-a UK de Esperanto, de TEJO ktp. Post detala pridiskuto la deklaracio, kiun aperigas aliloke, estas ĉiuvoĉe akceptita. (Daŭrigo sur p. 2)

Post akcepto de la programo starigas demando kiamaniere realigi ĝin. La sekvaj taskoj estas: en komunumoj krei komunagadkomitaton kiu kune kun klerigaj institucioj kaj lokaj entreprenoj estu laborforumo; postuli socian valoron de lernado kaj instruado de Esperanto; la taskoj en regula informado de la publiko; esperantigi instruistojn kaj prepari terenon por televida kurso.

Memkompreneble, ke la U.K. de E en Beograd 1973 kaj antaŭkongresaj preparoj, donas apartan eblecon por ion fari en Jugoslavio en tiu ĉi senco. La reprezentantoj de unuopaj E-ligoj esprimis la neceson ne sole utiligi la enketadon en Slovenio sed ankaŭ mem fari enketadon kelkloke en ĉiuj respublikoj. En la argumentado, oni substrekis tion, la ĉefa akcento estu donita al la batalo kontraŭ la lingva imperiismo.

Starigita sur tia bazo la ekzemplo de slovena kaj tutjugoslavia iniciato povus kaj devus sendube fariĝi grandskala tutmonda aktiveco, sekve ankaŭ la ĉefa temo de la sekvonta U.K. en Beograd (sub la labortitolo "La lingva egalrajteco en la praktiko"), dum kiu eble oni jam povus prezenti la unuajn tiurilatajn spertojn. M. Ĝivoje

Projekto de la Deklaracio

pri la lingva problemo en rilatoj inter la popoloj kaj naciecoj, adresota al la publiko, al reprezentantaj institucioj kaj politikaj forumoj por la pritrakto kaj prikonsidero

ENKONDUKO

Surbaze de la konstituciaj rajtoj, kiujn ĝuas la ŝtatanoj de Socialista Federacia Respubliko Jugoslavio laŭ la artikolo 43, kompletigita kun la Aldono XIX-a kaj en la senco de la konstituciaj principoj en la unua alineo de antaŭparolo kaj en la fundamentaj principoj de la enkonduko, parto I-a kaj VII-a, akorde kun la Programo de Komunista Unuiĝo de Jugoslavio kaj kun ĉefaj intencoj de la esperantista movado, formulitaj en la statutoj de Slovenia Esperanto-Ligo kaj de Jugoslavia Esperanto-Ligo, ni sentas nin morale, politike kaj kiel ŝtatanoj, devigataj aktive kunlabori en la kreado de la kondiĉoj, ke la konstituciaj rajtoj de popoloj kaj naciecoj de Jugoslavio ankaŭ sur la lingva kampo estu ju pli konsekvence respektataj kaj tiamaniere kontribui al ilia frateca kunvivado kaj egalrajta kunlaboro en komuneco de Jugoslavaj popoloj kaj same kun aliaj popoloj en la mondo.

Tio, kio ĝis nun estis nur la privilegio de diplomatoj kaj de malgrandaj rondoj de reprezentantoj, hodiaŭ jam estas ĉiutaga aktiveco de tre larĝaj popoltavoloj sur lakampoj de turismo, laborokupo, scienco, ekonomio kaj ankaŭ en kulturaj interŝanĝoj. La malfacilaĵoj, kiuj fontas el bezonoj por la interkompreniĝo de homaj amasoj, parolantaj la pléj diversajn lingvojn, hodiaŭ jam fariĝis anakronismo de la moderna socio, kies naciecaj limoj en scienco, tekniko kaj ekonomio jam delonge ne plu estas rekoneblaj. Ni ankoraŭ luktas kun la restaĵoj de naciece limigita aŭtarkia pensmaniero el la pasinteco sur la kampoj kultura kaj politika.

(daŭrigo sur paĝo 3)

Daŭrigo de paĝo 2

La homa racio venkis la fizikajn fortojn, kiuj ligis nin al la tero. Ni levigis en la kosmon kaj de tie ni vidis la mondon sen limoj, sen rasoj kaj naciecaj diferencoj, sen diversaj dioj, ni vidis nin kiel parton de la Universo kaj ekkonsciigis, kiel sensignifaj estas niaj internaj diferencigoj kaj antagonismoj. Ni lernis rigardi la mondon libere, senĝene, sen antaŭjuĝoj. Sur la kampo lingva ni persistas sur etablitaj pozicioj de la pasinteco, kvazaŭ okazus nenio. La satelitoj de grandpotencoj ĉirkaŭflugas nin kunportante ilian, ankaŭ lingvan, premon, ni malgranduloj restas kun nia sento de dependeco kaj malforto.

Tamen, ni ĉiuj hodiaŭ tre bone scias, ke la perspektivo de unuj kaj de aliaj ne estas en konservado sed en forigado de tiuj diferencoj en ekonomio, en scienco kaj en kulturo kaj ankaŭ en lingvo, kiel senpera interkompreniĝilo.

Tiu konscio estas en Jugoslavio tre viva kaj aktuala, ni ja estas multnacia lando, kun evoluintaj kaj malevoluintaj regionoj, kun multaj religiaj konvinkoj kaj kun diversaj lingvaj teritorioj. Ni estas miniatura mondo kun ĉiuj ĝiaj antagonismoj, kun forte aktivigita loĝantaro, kiu laŭ memmastruma principo reguligas reciprokajn rilatojn interne en la komuneco de jugoslaviaj popoloj kaj ekster ĝi.

Instigitaj kaj subtenataj per la rezultoj de la enketado inter la loĝantaro, kiu decide aprobis la Internacian Lingvon kaj atendas de ni konkretajn klopodojn por ĝia firmiĝo, ni atentigas ĉiujn reprezentantajn organojn kaj politikajn forumojn pri ĉiam pli aktualaj problemoj de la lingva diskriminacio en rilatoj inter la popoloj kaj naciecoj enlande kaj ekstere en la mondo.

Konsiderante ĉiam pli grandan firmiĝon de memmastruma socialisma sistemo, apertecon de nia socia komuneco kaj malfermitecon de ĝiaj limoj, ni opinias, ke la principa deklaro pri la rolo de la lingvo en rilatoj inter la popoloj kaj naciecoj povos kontribui al ĝusta perceptado de tiuj problemoj kaj helpi al principe-politika orientiĝo en la solvado de interpopolaj rilatoj sur la kampo lingva, kie ĝis nun regis senprincipa praktikismo, favore al la jam privilegitaj kaj malfavore al la malprivilegitaj popoloj.

Surbaze de la supraj premisoj ni **d e k l a r a s**

- ke en rilatoj inter la popoloj kaj ŝtatoj la demokrateco kaj egalrajteco devas esti respektata ankaŭ en la uzado de lingvoj;
- ke ni malakceptas la altrudadon de fremdaj naciaj lingvoj al nia kaj al ĉiu alia popolo kaj tial ankaŭ ni rezignas altrudi nian nacian lingvon al homoj, apartenantaj al aliaj popoloj kaj naciecoj;
- ke estu respektata ĉiu nacia lingvo kiel integra parto de popola individueco kaj esprimo de nacia aparteno;
- ke neniu privilegio estu donata al iu ajn nacia lingvo en rilatoj inter popoloj kaj naciecoj, ĉar el tiu privilegio naskiĝas novaj sociaj diferencigoj en kultura, ekonomia kaj politika sencoj.

(daŭrigo sur p. 4)

(Daŭrigo de p. 3)

Ni o p i n i a s

ke lingvajn problemojn oni devas solvadi laŭ la samaj principoj inter ĉiuj lingvaj grupigoj, inter la grandaj kaj malgrandaj popoloj kaj naciecoj, inter lingvaj majoritatoj kaj minoritatoj. Tiuj samaj principoj validu ankaŭ en rilatoj inter la ŝtatoj kaj inter la popoloj kaj naciecoj en multnaciaj ŝtatoj.

Ni k o n s t a t a s

ke ĉiuj ĝisnunaj formoj, uzataj en la solvado de lingva problemo restis ne nur neefikaj, sed ili eĉ pli komplikis ĝin pro la neglektado de la supraj principoj. Tial ni

p r o p o n a s

jenan solvon de la lingva problemo en rilatoj inter la popoloj kaj naciecoj:

- 1-e, ke ĉiu principe rezignu uzi propran nacian lingvon en rilatoj kun la aliaj popoloj kaj naciecoj;
- 2-e, ke la Internacia Lingvo Esperanto fariĝu dua lingvo por ĉiu. Ĝi estas ja samgrade fremda kaj samgrade propra al ĉiu kiel komuna lingvo por la internacia uzo kaj esprimo de aparteno al la pli larĝa homa komuneco.

Ljubljana, la 16-an de decembro 1972

SLOVENIA ESPERANTO-LIGO
kaj AMIKOJ DE ESPERANTO
en Slovenio

Fanfaro por Eŭropo kun Esperanto-voĉo

Londono (PE) Okaze de la aliĝo al la Eŭropa Ekonomia Komunumo Granda Britio aranĝas Festivalon, nomita "Fanfaro por Eŭropo". Ankaŭ la brita Esperanto-movado partoprenas en tiu festivalo. Brita Esperanto-Asocio invitis po unu junulon aŭ junulinon esperantistan en la aĝo inter 16 - 18 jaroj el ĉiuj naŭ aliĝintaj eŭropaj landoj, por montri la efikan funkcion de Esperanto en komuna Eŭropo. El FRG sekvis la inviton f-ino Petra Engel el Hamburgo. El la ŝipo "Prinz Hamlet", per kiu ŝi vojaĝis el Britio, Petra Engel sendis antaŭraporton kaj salutojn al Pilo-Press. En posta numero ni pli detale raportos.

Aŭstralia esperantisto gastis en Nürnberg

Nürnberg (PP) Juna aŭstralia esperantisto kun amiko el la aŭstralia urbo Brisbane gastis dum kelkaj horoj en la Esperanto-Centro Nürnberg. Raymond Bergmann, tiel lia nomo, troviĝas sur flugvojaĝo tra Eŭropo kaj volas ankaŭ utiligi siajn Esperanto-sciojn. Li daŭrigos la 9 jan 73 sian vojaĝon al Strasburgo, Frankfurto, Kolonjo, Hispanio, Svedio kaj Londono, de kie li reflugos al Brisbano.

Intensivkurso en la gazetaro

Paderborn (PP) Pri la malfermo de la intensivkurso en la altlernejoj Paderborn, pri kiu PP jam raportis pasintsemajne, aperis en du lokaj gazetoj, Westfälisches Volksblatt kaj Neue Westfälische, favoraj ilustritaj raportoj. La kurso finiĝis la 8 jan 73.

Nova GDR-publikigaĵo en Esperanto

Berlino (PP) Pli kaj pli Germana Demokratia Respubliko uzas Esperanton por propagandado kaj informado. Jus atingis nin du ekzempleroj de nova lukse presita revuo "Junularo", kiu prezentas kelkajn el la junaj gastigantoj de la X-a Monda Festivalo de la Junularo kaj Studentoj, kiu okazos ĉi-jare en Orienta Berlino. Sur 64 paĝoj kun multaj bildoj la magazino prezentas la junularon kaj unuopajn junulojn en GDR. Eldonis ĝin ŝtata eldonejo Zeit im Bild, Dresden. Haveblas verŝajne ĉe Centra Laborrondo de la Esperanto-amikoj, Berlino.

En la ombro de Leo Tolstoj

Blieskastel (IF de UEA) La Tria Franca Televida Programo kolora, kiu nur komencis siajn elsendojn la 31 dec 1972, havos elsendon kun Victor Lebrun, la lasta privata sekretario de Leo Tolstoj, pri kiu oni lastatempe ankaŭ parolis en la Esperanto-gazetaro. La elsendo okazos merkredon, 10 jan 1973, je la 19-a horo 10 (ĝis 19,40) La programo estas kaptebla ankaŭ en Belgio, Luksemburgio kaj en la apudaj regionoj de FRG kaj Svislando per la stacioj Lille, Nancy (kanalo 26), Strasburgo (kanalo 43). Franca televida gazeto menciis la simpation de Victor Lebrun por Esperanto.

La semajno en la Radio

Romo. Radio Romo elsendas ĉiudimanche de la 21,00 - 21,20 sur jenaj ondolongoj:

metroj	30,90	41,24	50,28
kilohercoj	9.710	7.275	5.990

La supraj ondolongoj validas ĝis fine de februaro 73.

La temoj de la elsendoj estas: 1a parto: Novaĵoj el Italio; 2a parto: Kuriero de Esperanto.

Berno La lunda prelego de d-ro A. Baur temis pri gastlaboristaj problemoj en Svislando, kiuj aktualas ankaŭ en FRG.

Pekino. La pekinaj elsendoj, vendrede kaj ŝabate, je 21a horo, estas ĝenerale bone aŭdeblaj. Protesto kontraŭ la bombado de Vjetnamio fare de usonaj bombaviadiloj. Postulo pri tuja subskribo de la interkonsentita kontrakto pri la ĉesigo de la milito. Kaj aliaj aktualaj politikaj temoj!

Varsovio. La aliĝo de tri pliaj eŭropaj ŝtatoj al la Eŭropa Ekonomia Komunumo, la vjetnamia milito, la 60a naskiĝtago de Edward Gierak estis temoj de komentarioj kaj notoj de la tago. La radia ĵurnalo ĉiutage raportis pri novaĵoj en Pollando kaj la mondo. La lunda Esperanto-ekspreso konencis sian vojaĝon en Varsovio, urbo de pulsanta vivo: Kontribuaĵoj de Esperantistoj por la rekonstruo de la Reĝa Kastelo. Intervjuaj gastoj: Rudi Graetz, prezidanto de CLR de GDR pri gazeta artikolo kaj F. Simonet pri la rolo de Esperanto en esperantistaj familioj, la portantoj de internacia kulturo. M. Dastych felietonis pri Hanojo en la nunaj tagoj kaj Jerzy Grum citis el la artikolo de d-ro W. Borrmann en Germana Esperanto-Revuo 8/72 "Bona 1973 estas laborriĉa 1973". - De longa tempo mi sukcesis denove aŭskulti al Esperanto-anguleto en la kadro de la germana programo de Pola Radio, dimanche, 7 jan 73, je la 22a horo, fine de tiu elsendo ĉ. 22,25. Jerzy Grum citis el kontribuaĵoj de germanaj aŭskultantoj al la pasinta konkurso pri paca internacia kunlaboro. Aŭdigis la voĉoj kaj opinioj de kelkaj germanaj esperantistoj.

Kara leganto!

Vi tenas en la mano la unuan numeron de Juna Amiko, Internacia Lerneja Esperanto-Revuo¹. Nia entuziasma lernantaro atendas ĝin jam de longe. Jaroj da penado, fine, rezultigis ĉi tiun modestan revuon.

La redakcio² esperas, ke nia nova eldonaĵo rikoltos vastan sukceson inter niaj lernantoj, instruistoj kaj komencantoj. La revuo celas helpi al ĉiuj legantoj en amikiĝo kun proksimaj kaj malproksimaj popoloj, kaj rapidigos ilian ekkonon, ke ni ĉiuj estas fratoj, kvankam unu vivas en Japanio, unu en Francio, unu en Brazilo kaj unu en Hungario. Dis-igas nin limoj kaj kutimoj; sed kun-igas nin varma deziro al paco kaj amikeco. Certe, ankaŭ vi volas koni ĉiujn hom-fratojn, al kiuj ligas nin similaj pensoj, similaj sentoj kaj sama estimo al Esperanto.

La redakcio helpas vin ĉia-maniere, por ke vi laŭ-eble progresu³ en la Internacia Lingvo, kaj por ke vi trovu interesajn legaĵojn jam en la komenco.

Tiu ĉi revuo estas por vi, kaj dependas de vi! Tra-legu la prov-numeron, diru vian opinion, kaj skribu al la redaktisto: kio plaĉis al vi, kaj kio mankas en la revuo. Ni klopodos pli-bonigi la en-havon, laŭ viaj proponoj.

Se la revuo kaptis vian intereson, se vi trovas ĝin utila, nepre abonu kaj abonigu ĝin! Ni deziras aperigi la revuon regule, kaj levi ĝian nivelon⁴ sen-ĉese; sed por tio ni bezonas subtenon, nome: vastan legantaron.

Karaj kolegoj⁵ instruistoj! De tempo al tempo, la paĝoj de nia eldonaĵo alportos interesan, facil-lingvan materialon. Ni uzos nur mil radik-vortojn, la plej oftajn. Ili baldaŭ operos en kajero kun nacilingvaj tradukoj. Provu animi viajn instru-horojn per legaĵoj el Juna Amiko.

Fine, sed ne laste, ni varme dankas al pluraj centoj da divers-landaj Esperanto-amikoj, kiuj subtenis nian celadon kaj efektivigis la eldonon. Ni petas pro ilia plua subteno.

Multan plezuron deziras al vi la Redakcio. ◀

Bestellen Sie auch Esperanto-Siegelmarken:



Europa Esperanto-Kongreso

Pentekoste 1973 en Luksemburgo

1 Folio kun 10 Markoj	=	-,85 GM
5 Folioj	=	3,-- GM
10 Folioj	=	5,50 GM

58-a Universala Kongreso de Esperanto 1973 en Beogrado, Jugoslavio

1 Folio kun 10 Markoj	=	-,85 GM
5 Folioj	=	3,-- GM
10 Folioj	=	5,50 GM

1 Glustelo por aŭtomobilo = 1,-- GM

Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1,
Postfach 2113



JUNA AMIKO

Internacia Lerneja Esperanto-Revuo

lautet der Titel einer Esperanto-Zeitschrift für Schüler und Anfänger, die bald regelmäßig erscheinen soll.

Soeben ist eine Probenummer erschienen.

Nebenstehend können Sie die Einführungsworte über Ziel und Zweck der Zeitschrift lesen.

Die Zeitschrift soll vor allem guten Lesestoff für Esperanto-Schulklassen liefern. Sie eignet sich aber auch für alle, die leichten Lesestoff suchen und sich durch Lesen in die Esperantosprache einarbeiten wollen.

Überzeugen Sie sich selbst!

Bestellen Sie ein Exemplar - oder auch mehrere - der Probenummer.

Der Preis ist niedrig.

1 Exemplar einschl. Porto kostet nur 1,-- DM

Für größere Bestellungen gelten folgende Preise: (einschl. Porto)

5 Expl.	=	3,90 DM
10 Expl.	=	7,70 DM
20 Expl.	=	15,10 DM
50 Expl.	=	34,50 DM

Bestellen Sie durch Überweisung des betreffenden Betrages auf das Postscheckkonto Ludwig Pickel, 85 Nürnberg, Nürnberg 2144 96-855